



MONATA BULTENO de la Esperanta Societo "FRATECO"

INICIATINTO: S-RO IZIDORO FLORJA - DIREKTORO: RAMON DE SALAS

Administracio kaj Redakcio: Str. RODA, n.º 14-16

NI ESTU INFANAJ

RICARDO LEÓN

I

La plor' forglitu, se l'dolor' amaras,
Kiel sur vitro glitante falas ros';
Forpeli la ĉagrenojn, kiel faras
Birdo, por polvon forskui sen ripoz'

Infana estu, gaja, nepensema,
Ĉar nek malbona nek bona estas viv';
Ja per elekt' fariĝos vi ĝojema,
Se spertogalon forpuŝas dolĉnaiv'

Se estas iluzi' mielfontano
Kaj amarfonto, la spert', por maljunul',
Por ĝui l' vivon, estu ja infano

Kun konscienc' kaj koro senmakulaj
Kuru for el la scienc', ĉar estas viv'
Rezulto el naiv' kaj bon' helpuraj

II

Ridadu kiel akvo murmuranta.
Kiel l'aero kaj fajr' ondiĝu vi,
Ne estu serioze fikspensanta,
Naĝu laŭ l' fluo afera sen pasi'

Flirtadu kiel papili' somera,
Igu la vian vivadon gaja lud',
Infano ĉiam estu sensufera,
Kiel abelo ĉe rozoj ĉirkaŭ bud'

Ĉar estas nur forges', vivart' esence,
Rompu vi, de priokupoj tute sklav',
La ĉenojn de l'memor' ĝenanta mense

Ne lasu tombojn malfermitaj tie
Kaj tre profunden ĉagrenojn metu for,
Tutkvazaŭ la mortintojn tradicie.

El la hispana tradukis,
RAMON DE SALAS.

AVIZO

Kaŭze de anonco en kelkaj Esperanto-gazetoj Frateco ricevis multege da leteroj kaj poŝtkartoj de koresponddezirantoj. Pro tiu abundego Frateco bedaŭrinde tute ne povas respondi unuope al ĉiuj kaj esprimas tie ĉi sian profundan kaj sinceran dankon al tiuj bonvolaj gesamideanoj.

EL «KIHOTO»

(Daŭrigo)

La religiuloj detenis la kolbridojn kaj restis mi-
rigitaj, tiom pri la figuro de don Kihoto, kiom pri
liaj diraĵoj, al kiuj ili respondis:

—Sinjor' kavaliro: ni estas nek diablaj, nek
monstraj, sed du religiuloj, el Sankta Penita ana-
ro, kiuj iras sian vojdon, kaj ne scias, ĉu en tiu ve-
turilo venas aŭ ne perfortitaj princinoj.

—Por mi ne taŭgas mildaj vortoj, diris don
Kihoto, ĉar mi jam vin konas, nefideblaj kanajloj.
Ne atentante respondon, li spronincitis Rocinanton
kaj kun lanco mallevita, li sin atakjetis al la unua
religiulo, tiel brave kaj furioze, ke se tiu ĉi ne es-
tus mem desaltinta de la mulino, li estus malgraŭ
sia volo renversita, eĉ grave vundita, se ne mortin-
ta. La dua religiulo, vidante kiamaniere oni trak-
tas lian kolegon, piedfrapis sian altkreskan kaj
bonan mulinon kaj alkuregis sur la kamparo pli
rapide, ol la vento mem. Sanĉo Panza, vidinte sur-
tere la religiulon, rapide desaltis de sia azeno, sin
jetis al li kaj komencis tiri el li la vestojn. Jen du
servistoj de la religiulo alvenis kaj demandis, kial
li senvestigas lin. Sanĉo respondis, ke tio legitime
apartenas al li, kiel venkakiraĵo de la batalo gaj-
nita de lia mastro don Kihoto. La servistoj, kiuj
ne sciis pri mokajoj, nek komprenis tiujn dirojn
pri venkakiro kaj batalo, rimarkante, ke don Ki-
hoto apartiĝis de tie kaj estis parolanta kun la
personoj en la veturilo, sin atakjetis al Sanĉo, fa-
ligis lin teren kaj ne lasante al li eĉ haron ĉe men-
tono, disbatis lin piedfrapade kaj lasis lin kuŝan-
tan, senspiran kaj senkonscian. Senprokraste la
religiulo rerajdis plentime kaj senkuraĝe, kun pa-
lega vizaĝo kaj tuj kuregis al sia kolego, kiu haltis
je sufiĉa interspaco kaj estis atendanta, kio fariĝos
el tia maltrankvilego. Ne volante atendi la finon
de la tuta komencita okazintaĵo, la religiuloj daŭ-
rigis sian vojradon, farante pli da krucosignoj,
ol se la diablo sidus sur ilia dorso. Dume, kiel oni
diris, don Kihoto antaŭ la veturila sinjorino, pa-
rolis al ŝi:

—Via Bela Moŝto, mia estrino, povas fari pri

via persono tion, kio plej plaĉas al ŝi, ĉar jam kuŝas surtere la fieriĝo de viaj forkaptintoj, renversita de tiu ĉi mia forta brako. Por ke vi ne penadu, volante ekscii la nomon de via liberiganto, bonvolu ekscii, ke mi nomiĝas don Kihoto de la Manĉo, vagira kavaliro, aventurema kaj amkaptita de la senegala kaj bela donja Dulcineo el Toboso, kaj repage por la bonfaro, kiun vi ricevis, mi nur volas, ke vi iru nun en Toboso'n kaj mianome prezentiĝu al tiu sinjorino kaj diru al ŝi, kion mi faris por vin reliberigi.

Ĉion diritan de don Kihoto aŭskultis unu el la armservistoj, akompanantaj la veturilon, kiu estis Vasko. Vidante, ke don Kihoto ne permesis, ke la veturilo antaŭen vojiru, sed male li parolis pri veturo en Toboson, la Vasko iris al don Kihoto, manprenis lian lancon, kaj diris al li en malbona hispana lingvo kaj plimalbona vaska:

—Iru, kavaliro, vi maltrafe iru. Je la Dio min kreinta, se ne vi veturilon lasas, tiel bone mortu, Vasko kiel estas mi. Tre bone don Kihoto lin komprenis kaj tre malflame li respondis:

—Se vi estus kavaliro, kiel vi ne estas, mi jam estus puninta vian sensaĝecon kaj malrespektemon, malfeliĉa infano. Al tio la Vasko rediris:

—Ĉu ne mi kavaliro? Mi ĵuras je Dio, kiel vi mensogas, kristano tiel; lancon se vi ĵetas kaj glavon eltiras, en la akvon kiel rapide vi vidos, ke la katon enkonduki; Vasko sur lando, kavaliro sur maro, hidalgo al la diablo kaj vi mensogas se alian diri atentis aferon.

—“Nun vi vidos ĝin, diris Agrajes”, respondis don Kihoto. Ĵetinte teren sian lancon, li eltiris la glavon, almetis la brakon tra la rondŝildo kaj atakegis la Vaskon, kun decido elŝiri el li la vivon. Vidante, ke li tiel venas, la Vasko estus ja volinta desalti de la mulino, al kiu, kiel malbona lubesto, oni ne povis fidi, sed li nur havis tempon eltiri sian glavon. Feliĉe li okaze troviĝis apud la veturilo, el kiu li povis preni kapkusenon, kiu taŭgis al li kiel ŝildo. Tuj ili atakis unu la alian, kvazaŭ ili estus ĝismortaj malamikoj. Ĉiuj alestantoj volis ilin repaciigi, sed senpove, ĉar la Vasko, per malerte kunligitaj frazoj diris, ke se oni ne lasos al li fini la duelon, li mem mortigos sian mastrinon kaj ĉiujn personojn, kiuj kontraŭstaros al lia faro. La veturila sinjorino, mirigita kaj kun timo, pro tio, kion ŝi vidis, ordonis la veturigiston iom flankeniri, kaj de malproksime ŝi ekrigardis la senkompatan duelon, dum kiu la Vasko donis al don Kihoto trans la rondŝildon surŝultran glavobaton, kiu, en okazo de sensirmado, estus lin trafendinta ĝis la talio. Sentante la trofortecon de tiu senmezura frapo, don Kihoto ekdiris laŭtege: Ho, mastrino de mia koro, Dulcineo, floro de beleco! helpu al tiu ĉi via kavaliro, kiu por kontentigi vian grandan bonecon trovas sin en tiu ĉi ekstrema danĝerokazo. Ĵus tion dirinte, li samtempe fortpremis la glavon, bone sin ŝirmis per la rondŝildo kaj atakegis la Vaskon, kun decido ĉion riski al unufoja frapo. Vidante, ke li tiel venas, la Vasko bone divenis laŭ lia flamiĝo lian kuragecon kaj decidis same fari kiel don Kihoto. Li, do, atendis lin bone ŝirmate de sia kapkuseneno, ne povante turnigi la mulinon, al kiu, tro laca kaj ne kutiminta al tiuj infanaj ludoj ne estis eble fari eĉ paŝon. Kiel oni diris, don Kihoto venis al la Vasko, kun levita glavo kaj decido meze lin trafendi kaj la Vasko atendis lin, ankaŭ kun levita glavo kaj kovrita de

sia kapkuseneno. Ĉiuj alestantoj estis kun timo kaj pendantaj de tio, kio venos el tiuj teruraj batoj, per kiuj ili minacis unu la alian. La veturila sinjorino, kun ĉiuj siaj servistinoj, faris mil ĵurajn promesojn al ĉiuj gesanktuloj kaj hispanaj fervorejoj, por ke Dio liberigu ilin kaj ŝian armserviston el la granda danĝero en kiu ili troviĝas. Sed la malbona flanko de tio ĉi estas, ke en tiu ĉi rakontopunkto la aŭtoro de la historio lasas nefinita la batalon, sub preteksto, ke pri la heroaĵoj de don Kihoto li ne trovis skribitan pli, el tio, kio estas raportita. Estas vere, ke la dua aŭtoro de tiu ĉi verko ne volis kredi, ke tiel kurioza historio estu fardonita al forgeseco kaj la Manĉaj sprituloj estu tiel malmulte sciamaj, ke ili ne konservu en siaj arĥivoj aŭ bibliotekoj manuskriptojn traktantajn pri tiu ĉi kavaliro. En tia supozo, do, li ne malesperis trovi la finon de tiu ĉi plaĉa historio, kiun li efektive trovis per ĉiela favoro, laŭ maniero pri-traktota en la dua parto (*).

El la hispana tradukis,
VICENTE INGLADA.

(*) Oni scias, ke Cervantes dividis la unuan volumon de Kihoto en kvar partojn, kies unuan finis tiu ĉi oka ĉapitro. Tiun dividon li forlasis dek jarojn poste, kiam li publikigis la duan volumon, kiun li nomis dua parto, konservante nur la laŭĉapitran dividon de la verko.

MALFERMITA LETERO

Karaj kunrondanoj: Dum longa tempo niaj nomoj montriĝis sur la skribfolioj en plej enigma anonimo. Kaj, kvankam mi, sindoneme via, eble estas, kiu de antaŭ malplej longe eniris la rondajn vicojn, hodiaŭ, ĉar ni konas nin reciproke almenaŭ nome kaj loĝloke, mi opinias, ke ni devas esti iom pli malkaŝemaj.

Goju, skribilo, pro via traŭro tra ĉi tiuj paperoj, torente verŝante sur ilin fratecon kaj disfoliigante bukedon de koraj salutoj.

Al mia menso venis ideoj, kiujn mi deziras fidi al ĉi tiuj paĝoj, kaj mi demandas:

Ĉu vi ne opinias, ke ni devus koni nin reciproke vidalvide? Por tio mi al ĉiuj proponas, ke en antaŭfiksita tago, ekzemple, la 15-an de la proksima oktobro, ni kunvenu en Kalatajudojn, por nin reciproke saluti kaj interkonatiĝi, manĝi kaj plenkunece pasigi tagon... kaj eĉ mi devigas min akiri, pere de Sro. Orós aŭ de aliaj, la Esperanto-himnon kaj kantigi ĝin ĥore. Tio ĉi estas ideo, kiel alia ajn. Malgraŭ ke mi ja konas iun rondanon, kies sonmembrano martelo, amboso aŭ io ajn en lia orelo ne bone funkcias en okazo kanti.

Aliaĵo: Se tio supre dirita ne plaĉas, mi proponas agi jene: Kunveni en Zaragozon kaj regali per manĝo nian karan kaj faman majstron, Sro. Josefo Orós, en “Gastejo de la Animoj”.

Mi opinias, ke ĉar la ĵus nomita sinjoro elportadis la tiel multedaŭran pluvon da sensencaĵoj, mallogikaĵoj kaj tiaspecaj aliaĵoj de ni faritaj en niaj tradukoj, kaj tion li faris laŭ vere benediktana pacienco, kaj ankaŭ por iel montri nian dankon pro liaj maldormoj favore al nia esperanto-klerigado k. t. p., k. t. p., ni ja devus fari tiun malgrandan oferon.

Do ni festus lin per manĝo, dum kiu ni amike interparolus, ni aŭdis la majstron kaj eĉ ni kuraĝus (nescieco estas tre kuraĝa) peti de li intervjuon por NIA VIVO.

Se tio ĉi ne plaĉas, vi havas ĉe la finiĝo de tiu ĉi letero iujn paperfoliojn, sur kiujn vi tutlibere povos skribi, kion pri la afero vi opinios taŭga.

Al mi venas aliaj ideetoj, kiujn mi ne volas skribi en ĉi tiujn paperojn, ĉar sufiĉas tiuj antaŭe diritaj. Krome nek Sro. Orós nek vi neos, ke per ili mi sukcesis almenaŭ unufoje forigi la trouzitan averton: "Eltirita el..." "Tradukita el..." kaj plenumi laŭlitere la ordonon, pri tio ke "ili estu originalaj verkoj aŭ el bonaj aŭtoroj". Pri tio unua vi ne neos la aŭtentikecon kaj patrecon de la jena verketo; kaj pri tio dua sufiĉas aserti, ke, kiel ni hispanoj diras, "mi havas eĉ nek unu haron de malsaĝulo". Almenaŭ tion diris mia patrino, tuj post kiam mi naskiĝis.

Vi pensos, ke mi estas bonhumora homo. Eble: kelkfoje mi malŝparas bonhumoron.

Sed, por ke ĉi tiu letero ne rezultu enuiga, mi metu la finan punkton.

Je via dispono samideane kaj kunlernante.

ANTONIO CASTILLO VELILLA.

El la rondeto «La Kvara».

EL INFANAJ JAROJ DE MARŜALO PILSUDSKI

I

Józef Pilsudski naskiĝis la 5-an de Decembro 1867 en Zulów, proksime al Vilno, en bieno de siaj gepatroj. Bela estis ĉi tiu vilaĝo kaj bela ankaŭ estis la tuta ĉirkaŭaĵo de ĝi. Proksime al ĝi etendiĝis la densa arbaro kaj antaŭ ĝi verdiĝis printempe fruktodonaj kampoj. En la valo gaje flustris la rivereto kaj ambaŭflanke de la larĝa ŝoseo kreskis la blankaj betuloj. Inter ĉi tiuj verdaĵoj staris bela vilaĝa domo de gesinjoroj Pilsudski.

La gefratoj de Marŝalo konsistis el kvin knaboj kaj du knabinoj. Inter ĉiuj la plej grava persono estis la 9-jara "Ziuk". La fratoj opiniis lin sia komandanto. La servo sub li ne estis facila. La militekzercoj okazadis ne nur dum la tago, sed ankaŭ dum la nokto. Precipe la lastaj estis por la fratoj tre emociaj. Al ĉi tiuj noktaj ekzercoj la komandanto Ziuk kunvokis la fratojn, kiam la plenaĝuloj jam bone dormis en la tuta domo.

II

La komandanto de la malamika militistaro estis sinjorino Cecilio, kiu dormis en la aparta ĉambro. Iufoje la juna komandanto sendis tien uru el siaj fratoj, por ke li, kiel patrolo, eksci, kiĉn faras la malamika komandanto. Kiel pruvo, ke li plenumis la ordonon, li devis reveni kun ŝia ŝlosilaro, kuŝanta sur la nokta tableto, apud la lito de sinjorino Cecilio.

—Laŭ via ordono, sinjoro komandanto!—diris la frateto. Li forlasis sian varman liteton kaj iris tra la noktaj mallumoj. Liaj piedetoj tremis pro timo.

Longe daŭris, kiam li fine trovis la pordon al la gepatra ĉambro, kiun oni devis trairi por atingi la ĉelon. Li volis malfermi la pordon senbrue, delikate. La pordo tamen iomete ekknaris. Feliĉe neniu

tion ekaŭdis. Al la malalta patrolo ŝajnis, ke el ĉiuj flankoj insidas lin en mallumoj la minacaj dangeroj. Spite denove ekkrakis la planko. La patro ekmoviĝis en la lito. La patrolo retenis la spiron. Sed la patro ne vekigiĝis. Refoje ekregis silento, sonoranta en oreloj.

La patrolo estas fine apud la pordo de la malamika komandanto. Li alprenis kuraĝon. Subite... krako, kvazaŭ la plafono falegus sur la plankon! Jen la seĝo renversiĝis. La gepatroj elsaltis el la litoj. Malfeliĉo!! La patrolo forkuras kiel eble rapide al sia varmeta liteto. Ho, kio sekvis poste!...

III

Ne ĉiam la noktaj ekzercoj tiel malbone finiĝis. Iun nokton la komandanto Ziuk forsendis alian frateton kun la sama ordono. La nova patrolo longe ne revenadis. Fine, post duono da horo, li revenis, portante fiere la ŝlosilaron de sinjorino Cecilio.

—Terure mi timis!—konfesis la venkinto.

—Timi estas permesite—instruis lin la komandanto. Sed krom timo vi montris ankaŭ la bravecon kaj ĉi tio estas la plej grava. Vi montriĝis bravulo.

Kaj la komandanto alpinglis al la nokta ĉemizeto de la venkinto ordenon, kiun li mem dum la tago bele eltranĉis el ora papero.

La 9-jara komandanto Ziuk fariĝis poste la unua Marŝalo de Polujo. Józef Pilsudski venkis en gravaj bataloj multajn malamikojn. Ofte en sia vivo li elsendadis noktajn patrolojn kaj la ordenojn li alkroĉadis al la brustoj de multaj armeestroj kaj de multaj, multaj soldatoj, kiuj montris sian bravecon.

Marŝalo Pilsudski estas por ni Poloj simbolo de senlaca kaj sindona laborado por la bono de la patrujo. Kaj li vere agis tiel, li solene proklamis en vortoj de sia iama artikolo: "Venas tempoj, kies eco estas vetkuro de la laboro, kiel antaŭe estis vetkuro de la sango, kiel antaŭe estis vetkuro de la fero!"

* * *

La 12-an de Majo de la jaro 1935 kruela morto forrabis el inter ni la plej amatan Marŝalon, kies ĝistempaj restaĵoj post la lasta triumfa marŝado al Krakovo atingis la eternan ripozejon en la reĝa kastelo Wawel. Tie li ripozas por eterne apud la reĝoj kaj naciaj herooj—Li, la plej granda—La Reviviginto de Polujo!—Marŝalo Józef Pilsudski.

Prof. Sygmarski, Bydgoszcz - Polujo.

Opinioj pri Sango kaj Sablo

El «La Praktiko»: ... Koran gratulon meritas nia samideano Sro. R. de Salas kaj la Aragona Esp. Federacio pro la traduko kaj publikigo de tiu ĉi mondfama verko de la eminenta hispana aŭtoro. Kun streĉa intereso ni sekvas la majstrajn priskribojn de la hispana vivo kaj en tio helpas nin la bona lingvo de la traduko. Ĉi tiu libro estas notinda gajno por la Esp-a literaturo. La preso kaj papero estas bonaj kaj la kovrilon ornamas tre bela plurkolora, presita bildo. Sendube multaj esp-istoj kaptos la okazon por ĉerpi detalajn konojn pri Hispanujo kaj ĝia popolo el fonto verkita kun granda arto.

XIII-a Internacia Tendaro de Skolta Esperanta Ligo (SEL)

Dank' al Pola Skolta Asocio, kiu oficiale invitis SEL por tendari en Pollando, la XIII-a Tendaro okazis en kadroj de la Jubilea Nacia Jamboreo de polaj skoltoj. La SEL programo estis do oficiale enmetita en la Jamboreo programo.

Preskaŭ ĉiuj skoltoj esperantistaj alvenis kun siaj naciaj karavanoj, kiuj reprezentis landon dum la Jubilea Pola Jamboreo. Ili ĉiutage kunvenis je la deka matene kaj je la kvina posttagmeze en la esperanto-tendoj konstruitaj tuj apud la hungara tendaro ĉe rivero Pilica kaj arbaro Spala. La tendarloko estis belega kaj unika. La kunvenojn ĉeestis proksimume 150 geskoltoj esp. kiuj reprezentis 7 naciojn. Kiel notindajn faktojn oni inter aliaj menciis: ke ĉiuj anoj de la 7-a bydgoŝca pola skoltgrupo parolas esperanton; la kasisto de SEL, aviadisto H. Davis, kiu reprezentis Ligon dum XIII-a Tendaro, alvenis aerplane, kaj la norvega skoltfrato Arne Grønli, aktiva propagandisto, biciklis tra kvin landoj por alveni en la tendaron.

La oficiala malfermo je la SEL-Tendaro okazis la 16-an de julio en la tago festita de la eksterlanda skoltfrataro. La Konferenco okazis sub la alta, honora prezido de majoro Salkey, gvidanto je hungaraj rover-skoltoj, t. e.: plejaĝaj skoltoj, kaj prezidanto de Hungara, skolta esp.-rondo de Budapeŝto. Prezidis vigla, hungara rover-skoito Jozsef Szecsef. Oni legis multe da sukcesdeziraj salutleteroj, inter ili, iun de nia kara komitatano de Frateco Sro. Petro Marqueta, ĉefdelegito de SEL en Hispanujo.

Laŭ la SEL-raporto la Ligo interesis multajn rover-skoltojn kaj la nombro de SEL-anoj same, kiel tiu de delegitoj, pligrandiĝis. La oficiala SEL-gazeto "Skolta Bulteno" estos pli interesa kaj ilustrita estonte.

Oni faris tre belan lecion kaj oni oficiale deziresprimis pri kelkaj gravaj punktoj.

En la sekvantaj tagoj okazis kvar pliaj kunsidoj temantaj pri tre interesaj, difinitaj aferoj.

Dum la kunvenoj oni pritraktis la aferon de korespondado kaj *interskolta ŝanĝo de esp. skoltoj el diversaj landoj por pasigi tendartempon eksterlande.*

Esperanto-ekspozicio estis iu el la plej belaj kaj interesaj dum la jamboreo. Ĝin vizitis multaj eminentuloj kaj skoltfratoj.

La fermo je la Tendaro okazis la 22-an de julio. La diverslanda gazetaro multe raportis pri la SEL-tendaro, speciale la Pola Agentejo Telegrafa kun la plej grava, pola ĵurnalo "Ilustrowany Kuryer Godzienny, kiuj ofte kaj detale sciigis pri la XIII SEL-tendaro en Pollando.

El la raporto de la Organiza Komitato por la XIII SEL-Tendaro.

SPRITAĴOJ

En la ŝuvendejo: Vilaĝano iras en ŝuvendejon kaj petas paron da botoj. La ŝuvendisto, kiam vidis tiel grandajn piedojn, ekkriis:

—Ho, kia piedo! mi neniam vidis alian saman!

—Ĉu ne?—diris la vilaĝano—rigardu la alian.

La patrino:—Hodiaŭ ĉi estis tre malbona, kiam alvenos via patro mi tion diros al li.

La filo:—Ja oni konas, ke vi estas virino! Vi nepovas silenti sekreton!

Profesoro:—Kiu estas la estinta tempo de la verbo vekigi?

Lernanto:—Dormi!...

La juĝisto:—Kie, antaŭe, mi vidis vin?

La akuzato:—Mi havis la honoron doni kantlenciojn al via filino.

La juĝisto:—Kvindek jarojn da punlaboroj!

F. CRUZ DE LA ROSA.

PENSOJ

La pensoj estas kiel algebraj formuloj. Por tiu, kiu nescias ilin uzi, ili estas kvazaŭ hieroglifoj.

La facilajo plej malfacila estas esti patro.

Se miaj gefiloj obeus min pro timo, mi estus la plej malfeliĉa patro el la mondo.

Puni nur por la puno mem, ne celante pli altan rezultaton, estas krei du kulpulojn anstataŭ unu.

Kiu estas kulpa je la unua fojo, tiu li mem per sia vizaĝo sin denuncas tiel facile kiel sorbpapero denuncas la unuan skribajon kiun ĝi sekigis. Sed ĉiu nova inkosorbo estas pli malfacile legebla, ĝis kiam tio estas nebla. Kiam la sorbpapero estas troinkohava oni ĝin senutiligas. Same oni devas fari rilate la persistan kulpulon.

La vortaro estas spegulo de vortoj, sed la spegulo nur montras la supraĵon ne la enhavon.

JOSÉ ORÓS.

AVISO IMPORTANTE

Se pone en conocimiento de todos los asociados de FRATECO que, como en años anteriores, hemos adquirido lotería de Navidad, que será distribuida en participaciones de una peseta, por cada una de las cuales se abonarán cinco céntimos a beneficio de la Sociedad.

Rogamos a nuestros consocios se apresuren a preparar sus pedidos lo antes posible, para evitar no poder servir los encargos por agotarse ésta, como sucedió el pasado año.

En el próximo número de NIA VIVO daremos más detalles.

Presejo F. Martínez.- Strato Audiencia, 3-5 - Zaragoza (Hispanujo)

